Jen ĝeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj NRO/CSO-oj .
Diversaj peticio-petoj troviĝas je Ekologio aŭ je Homaj Rajtoj

Proponita kotizo por AVE estas: 10 EUR jare, pli aŭ malpli eblas.
Nia UEA-Konto: avex-z ; Bonvolu noti: (de "via nomo" por Kto. avex-z)
Mia persona konto de kiu mi transpagas al Afriko: Dr. Manfred Westermayer, Volksbank Freiburg, IBAN DE31 6809 0000 0007 8681 11 ; BIC GENODE61FR1

Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.
Adreso: AVE, Weissdornweg 68, 53177 Bonn, Germanio
Retejo de AVE:
>verduloj.org

Ni tradukis la Manifeston 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur www.verduloj.org) kaj la Ĉarton de GlobalGreens.org -
>globalgreens.org/about/charter/

ECI (Europa civitana Iniciativo): necesas 1.000.000 da subskriboj el minimume 7 diversaj EU-landoj; kolektenda ene de 12 monatoj. Tamen indas subskribi rapide, por atingi la kvanton sufiche frue.
Bazajn informojn en Esperanto pri ECI vi trovos en vikipedio - kaj de tie estas ligoj por legi detale en 18 lingvoj.
>eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa_civitana_iniciato

= = = = =

= = =

Jen peto de Espoir Kasati, kiu ĵus finkonstruis propran domon en Lubumbashi.
Li skribis (koncizigite):
En tiu nia nova kvartalo mankas elektro kaj akvoprovizo. En la domo estas esperanto-gastejo kaj e-biblioteko. Ni fosas ĝenerale putojn por trovi akvon, tio ne ĝenas...
Tamen por plulabori por esperanto kiel instruisto gvidanta retajn kursojn unue, kaj due kiel aktivulo en pluraj esperantistaj projektoj kaj programoj, mi bezonas konstantan retaliron kaj tio ja eblas se estas konstanta elektro – necesas FV (fotovoltaiko). Mi bezonas:
1) 2 litiajn bateriojn de 120 Ah por havi elektron post sunsubiro: 340$
2) 2 sunpanelojn de 250 Watt: 200$
3) Konvertilon: 25$
4) 100 metrojn da kabloj kaj la instalado: 50$ + 50$
**SUME : 665$, Persona kontribuo : 150$, mankas: 515$**
Jen lia reta prezento:
> uea.org/vikio/Kategorio:Nova%C4%B5oj_-_Espoir_NGOMA_KASATI
Intertempe li ricevis 500$ de unu el niaj samideanoj, aparte pro tio, ke li aktivas por Esperanto.

-----

AVENO 2026-04-16

mi esperas ke pluraj el vi partoprenos la UK-on en Graco, Aŭstrio. Ni okazigos publikan kunvenon por montri niajn agadojn kaj mi esperas ke ni povos elekti novan sekretarion por la kunlaboro kun la Verdulaj Partioj. Kompreneble tiu persono devas esti membro de iu Verda/Verdula/ekologiema partio. Michael Leibman el Francio pretas transpreni ĉi tiun postenon - ankaŭ sen salajro.

Michael jam organizis modernan ret-paĝaron, kiu uzas Esperanton, kaj krome ofertas tradukojn en la anglan, francan kaj germanan.

**Verduloj.com**

Mi restos respondeculo pri nia per-Esperanto-Agado, dum mi povas aŭ ĝis alvenos homo kiu

pretas zorgi pri tio. Unu el la gravaj temoj estas akcepti projekton, kiu bezonas longdaŭran subtenon. Do, serĉi subtenantojn, antaŭ akcepto de nova projekto. Bedaŭrinde la fondusoj kiujn mi konas akceptas nur projektojn kiu daŭras ne pli ol 1 jaron, ĉar ili ne povas antaŭvidi la estontecon.

Do, long-daŭrajn projektojn (ekz-e stipendio por studentoj) povas nur akcepti homo kiu mem povas garantii, sekve se necesas, povas kaj pretas uzi sian propran monon. Alikaze ni devos redukti ĉi-tiun agadon al ĉ. dek-ono. Jam pli bone ol nenio.

- - -

Jen interesa politika anonco kiun sendis Ronaldo:

"*De la 15-a ĝis 17-a de majo okazos ekosocialisma renkontiĝo internacia en Bruselo. Ĝies laborlingvoj estos la Angla, Franca kaj Hispana. Bele estus se mi ne estus la sola esp-isto tie*
*informoj troveblas je* https://www.alterecosoc.org/ "

Bonvolu kontakti lin se vi interesiĝas partopreni, jen lia ret-adreso: rmmn () uea.org

- - -
2026-08 Sekva kunveno de AVE dum la UK en Graz [graco]
Dank al Ada kaj Mirejo eblis kunveni okaze de la du antaŭaj UK-oj.
Ĉi jare mi planas mem partopreni. Kaj mi ĝojas ke Michael Leibman pretas transpreni la postenon de AVE-sekretario, por teni la kontaktojn kun la Verdaj Partioj tutmonde.
Li jam organizis modernan retejon: verduloj.com
Kaj restas la malnova retejo kiel arkivo: verduloj.org

Mi reduktos la laboron al nia per-Esperanto-Agado, sed jam komprenas ke ni ne plu povas atingi la saman kvanton kiel dum la lastaj jaroj, ĉar nur malmultaj de AVE-anoj povis subteni ĝin. Por ili tut-koran dankon.

Aktuale ni kolektas monon por finpagi kotizojn de studentoj, por trinkakvo en Bukavu kaj Kakutja, DR Kongo. Kaj ni subtenas novan projekton kiu subtenas indiĝenan etnon en Burundo, pri trinkakvo kaj arbar-forsta kulturo, ĉi-lasta en kunlaboro kun BAVELO.

- - -
2026-01-12 Financ-raporto de AVE
Dum la jaro 2025 ni ricevis membrokotizojn de 30 membroj (285 €), koran dankon, tio estas la bazo de nia laboro, kadre de UEA, kun eta aldono al nia per-Esperanto-Agado.
= =

2026-01-01 Subteni per-Esperanto-Agadon

Karaj samideanoj, ni ĉiuj scias ke Esperanto estas pli ol nura lingvo, estas filozofia bazo de kunvivado inter diversaj kontinentoj kaj etnoj.
Jen eta listo de organizoj kiuj (plejparte) subtenas samideanojn kaj ties familiojn en Ukrainio, kiuj suferas pro la imperialisma milito de Putin kontraŭ tuta Ukrainio.

Roskilde Festivalo, delonge kun granda Esperanto-grupo, tie Jakob Nordfalk organizas:
Subtenon por afrikaj projektoj: kolekti en kurado dum la Festivalo - aŭ aliaj Esperanto-renkontiĝoj:
>kuriporkongo.wordpress.com/

kaj subtenon por samideanoj en Ukrainio, kiuj suferas de tiu milito:
>retejo.info/ukrainio/dana-helpo/
kaj jen lia konto ISBN DK1684010001557778
Atentu: li petas subteni almenaŭ 100€ pro la administrada laboro; se por vi estas tro multe, eble vi trovas amikon kiu amendos vian subtenon ;)
- - -

Jen alia konto por subteni Ukrianion - uzante nomon en Esperanto:
>libereco.org/de/deutschland/ukraine
- - -

La konto „Espero“ de UEA, por subteni viktimojn kiuj suferas pro milito aŭ natura katastrofo:
https://uea.org/alighoj/donacoj/espero
Eble vi povas noti vian preferatan celon.

- - - - - -

Ni ne forgesu la per-Esperanto-Agadon kiun subtenas AVE:
- Mazingira en Tanzanio: lernantoj, biogaso, rearbarigo

- Rumonge en Burundo - kune kun BAVELO (Baden-Virtemberga Eo Ligo), partnereco de ANEB
  - Infanĝardeno en parto de la Esperanto-Centro
  - Bazlernejo

- En D.R. Kongo, por ricevi monon de fonduso, ni devas aldoni ĉ. 15% :
  - Trinkakvo : Bukavu de pastro Hubert
  - Trinkakvo : nova projekto de Etienne en Kakutja,
  - Lernantoj, studentoj, ĉefe en Goma,

Mia persona konto de kie mi transpagas al niaj projektoj troviĝas tute supre.

- - - - - jen 2 informoj pri ekologio - - - -

2026-01-03 Peticio por savi pluvarbarojn en Borneo
Ĉu ne estas preferinde havi aŭtomobilon en kiu oni povas tranokti kaj veturi de unu bela loko al la sekva. Kelkaj homoj havas sufiĉe da mono.
La problemo, por konstrui tian „RV“ (Recreational Van - kamioneto por ripozi) oni preferas taŭgan lignon - Meranti. Kaj tio kreskas en tiaj pluvarbaroj.
Sed nun iu firmao senarbarigis gigantan arabron de 40.000 hektaroj por tie kreskigi nur ĉi-tiajn arbojn. Kompreneble granda damaĝo por la naturo.

Jen peticio (ĝis nun) nur en la angla, kutime „eko.org“ informas en pluraj lingvoj:

>action.eko.org/a/no-more-deforestation-plywood-for-camper-vans
- - -

2026-01-01 Biogaso transportebla modelo

Jen iniciativo kiu subtenas la produktadon kaj uzadon;
kaj eĉ vendon de biogaso (en portebla balono)
sur bone elpensita, plej baza nivelo:
>be-nrg.com/welcome/
- --- fino